

# ESPERO KATOLIKA

REVUO MONATA

## PRI CENTRA KOMITATO ESPERANTISTA

Tre Estimata Sinjoro.

En No 16-a de via bela ĵurnalo vi demandas unue: kion oni pensas pri la kreo, organizado, okupado de Centra Komitato aŭ Akademio Esperantista?

Permesu al mi pri paroli tiun demandon laŭ mia penso. Mi estante unu el la plej malnovaj kaj maljunaj Esperantistoj, jam de longe proponis Centran Komitaton aŭ Akademion kaj parolis pri tiu jam en la 2<sup>o</sup> eldono de mia gramatiko Germana-Esperanta. Mi firme kredas la kreon de tia komitato absolute necesa, ĉar unue: la iniciatoro de nia komuna lingvo ankaŭ iam estonte devos fari la grandan vojaĝon al la eterna lando, kaj tiam ni estos sen ia plene rajtigita anstataŭulo; due: disvolviĝo de la Esperanta vorttrezoro senkondiĉe postulas la estigon de ia aŭtoritato, sen kiu la plua disvolviĝo de nia lingvo vere fariĝus babilona!

Mi kredas, ke la kreo de tia komitato tute ne estos malfacila, sed kontraŭe tre simpla! Nia lingvo, estante *internacia*, devas esti disvolvata laŭ «*internacia*» konsento, precipe koncerne la estigo de novaj radikoj kaj vortfaradoj, kiel ankaŭ koncerne certaj formoj jam konitaj kiel plejeble pli simpligindaj, se ne eĉ forigindaj. Ekzistas nelogikaĵoj, dusencaĵoj, neoportunaĵoj, — ekzistas ankaŭ diversaĵoj kaj kontraŭaĵoj!

Mi devas konstati, ke per tiaj, «aliigaĵoj» la gramatika *fundamento* de nia lingvo tute ne estos tuŝata, absolute ne! Tiu fundamento do estas propre la *esenco* de nia lingva formado kaj Esperanto jam ne estus Esperanto, kiam oni intencus aliigi ion kiu absolute apartenas al ĝia fundamenta organismo!

Sed nerifuteble, nia nuna estado koncerne la disvolviĝo de nia komuna lingvo estas tia, ke unu sola viro, kvankam science instruita li estus pri naciaj lingvoj, tamen jam ne povus esti sendependa aŭtoritato koncerne ĉiuj internaciaj postuloj! Ni senkondiĉe bezonas internacie kunmetitan komitaton, kiu laŭ antaŭa interkonsiliĝo kaj priparolado, — kiuj ambaŭ fariĝus skribe per rondirantaj cirkuleroj, — fine fiksu la terminojn necesajn kiel ankaŭ la novajn necesajn kreotaĵojn!

Per tio mi jam diris kion mi pensas pri la kreo, organizado kaj okupado de tia centra komitato. Ekzistas ja en ĉiu nacia Esperantistaro personoj sufiĉe science kleraj kiuj povos esti juĝataj kiel indaj membroj de tiu internacia komitato. La proponoj povas esti farotaj per la diversaj jam ekzistantaj Esperantaj gazetoj, kaj la

centra komitato havus la devon, interkonsiliĝi pri ĉia el tiaj proponoj, kiel ankaŭ pri tiuj, kiuj estos prezentataj rekte al ĝi ! Kompreneble la centra komitato devos elekti propran organon el la Esperantaj gazetoj, kaj mi pensas ke *Lingvo Internacia* estus la plej taŭga por la sciigoj de la komitato.

La kreo de tiu komitato devos, — mi pensas ke estas memkompreneble, — esti farata per la Esperantista Kongreso en Boulogne-sur-Mer, kaj tiu kongreso per si mem estos aŭtoritato !

Mi pensas pluen, ke ankaŭ via dua demando estas respondebla per la dirito ! Ĉu la centra komitato ne ankaŭ nature devos verkadi la *Universalan Vortaron de nomoj propraj* ? « Kiu alia ajn ĝin verkadus ?

Sufiĉu la dirito por unue ! Ke aliaj Esperantistoj aukaŭ ekparolu pri tiuj demandoj ! Estu jam pri tiu afero *internacia interkonsiliĝo* ! Eble vi permesos al mi <sup>1</sup>, ke, laŭ cirkonstancoj, mi ankoraŭ iam poste reparolu pri tiu grava afero ; ĉar mi kredas, ke la afero des pli bone klariĝos, ju pli detale kaj ĉiuparte ni ĝin traktados !

Dezirante bonan sukceson al via utila entrepreno, mi vin salutas per Esperantista saluto !

Via samideano kaj nuna kunlaboranto ; MUNĤENO, 4<sup>an</sup> de Aprilo 1905.

L.-E. MEIER.

## FRANÇOIS COPPÉE

### SUPER LA NUBO (Sekvo). <sup>1</sup>.

« Mi unue pensis, ke li incitete ŝercis, Sed ne . Nenio pli facila. Oni bezonis nur eniri veturilon kaj sin kondukigi ĝis ian altecon, sur la flanko de l'Salev'o (Salève), poste piede grimpi kelkajn vojetojn de l'monto, kaj oni troviĝus super la nebulo, oni vidus la sunon kaj la bluan ĉielon.

Estu ni justaj ! Jen plezuro, kion oni ne povus prezenti al si, dum plena vintro, en Parizokajeĉ en Monmartr'o (Montmartre) sur la turoj de l'preĝejo « Sanktega-Koro » .

Kompreneble mi ĝoje akceptis la logantan proponon kaj, duonhoron poste, ni sidiĝis en veturilo tre komforta, sed kies vitraĵoj estis blindigataj de maldiafana akvovaporo, kiu izolis nin de l'ekstera mondo.

Ni « ruliĝis » dum kelke da tempo, unue trotante, poste paŝante ; ni konsciis la supreniradon nur per la penadoj de l'ĉevaloj ; kio tiel forte sentiĝas funde de veturilo.

Kiam ni haltis, ni malsupreniris plenmeze de l'nubo .

La malvarmo forte pinĉis. Ĝis dek paŝoj antaŭen oni nenion vidis. Cetere oni devis rigardadi la sojlon, por ne faleti en radokavoj kaj en la koto duone frostiĝita. Dekstre kaj maldekstre la trunkoj de l'arboj elstaris, konfuze skizataj kaj kvazaŭ envolvitaj de vato. Kvankam

<sup>1</sup>. Plezure kaj dankeme.

<sup>1</sup>. Vidu E. K., n-oj 15 kaj 16.

mi tiam estis sufiĉe solida piediranto, — ho ve! mi ne povus nun tion diri — la suprenrampado ŝajnis al mi malfacila. Ni ŝvitis sub niaj paltoj, ni spiregis kaj elpelis, — mia kunvojaĝanto kaj mi, — per la buŝo kaj naztruoj. triopan ĵeton da fumo, kiu tuj malaperis kaj miksiĝis kun la nebulo. Tamen, apogante nin sur bastono kaj malrapide paŝante per plilongigitaj paŝoj de Alpinisto, ni marŝadis kaj iom post iom altiĝis tra la blanka vaporo.

Fine ĝi fariĝis pli maldensa, hele rozkolora, — kvazaŭ antaŭveno ia de l'suno. La celo proksimiĝis. Tiam ekvidis ni la malseketan herbon de la deklivoj, la ŝelon de l'kverkoj mordetitan de vermoj, la verdaĵon de l'arbetoj kun ĉiamverdaj folioj. Laste antaŭ ni aperis la suproj de l'pinoj, kaj super niaj kapoj hele kaj rave blua lumo disverŝiĝis

Ĝi estis la ĉielo. Ni estis super la nubo,

Eĉ se mi vivadus cent jarojn, — kion mi ne deziras kaj kio estus cetere absurda kaj skandala, — mi neniam forgesus la ĝojon, ĉarmon, ravadon, kiuj posedis kaj empenetris min antaŭ tiu mirinda spektaklo.

Ni troviĝis pinte de ia promontoro, kaj tutĉirkaŭe sterniĝis kaj disvolviĝis antaŭ niaj okuloj grandega golfo, laktokolora, kiu estis la nubo ĵus trairata de ni kaj funde de kiu kuŝis Genevo kun ĝia lago. El tiu vapora maro suprenvenis kriadoj, vokadoj, ruladoj de veturiloj, iafoje tranĉa fajfo de vaĝonaro, ĉiuj la bruoj de granda urbo. Mi tie revadis pri l'Atlantido mistera, kaj mi membris la legendan urbon Is'on, kiu malaperis sub la Morbihan'aj ondoj, kaj kies sonorilojn la maristoj en danĝerego kredas aŭdi.

Kontraŭ ni kaj, por tiel diri, sur l'alia bordo, la Ĵura montaro el la nuboj altiĝis, tutblanka, dum dekstre la lakta oceano perdiĝis horizon ten kaj unuiĝis, per nedistingeblaj nuancoj, kun la pala lazuro de l'ĉielo. Kelkafoje mevo Leman'a elaperis subite el l'abismo nebulega, flugadis unu aŭ du minutojn, per grandaj flugilbatoj, en plena lumo, poste malsuprenflugis kaj reiris en la nubon kun akuta krio, kvazaŭ por moki la loĝantojn de la granda urbo, kiuj rampadis en la profunde gaĵo; kaj nenio pli fantazidona ol tiu blanka maro, el kiu senĉese elflugis kaj en kiun subflugis birdoj. Sur tiuj mirindaĵoj vintra suno, hela kaj malvarmeta, triumfe staris, meze de l'ĉielo, disigante malproksimen sur la neĝajn pintojn malvokoloran lumeton kun adorinda nuanco, kaj ĉirkaŭ ni briligante, kiel emajloj, la malseketajn verdaĵojn.

Jes, mi ĉiam ilin memoros miajn ravajn korbatojn, mian profundan elspiron entuziasman, kiam, post tiu peniga irado tra nebulo malhela kaj malsaniga, mi subite staris antaŭ tiu ĉi mirteatraĵo de la naturo, kaj restadis tutravita de tiom da miregeco kaj pureco!

Kial la memoro, jam tiel malproksima, de tiu sentitaĵo mirinda

kaj eble neresentebla en mia vivo, vizitas min hodiaŭ kun tioma persisteco?

Ah! tial ke mi ĵus kruele suferadis, kaj ke mi ankoraŭ suferas ĉiutage en mia karno; tial ke por mi jen estas la vintro de la vivo, la maljuneco kun ĝiaj kriplajoj. Antaŭ nelonge, tiu ruiniĝo malesperigis min, kaj mi sufokiĝis en nebulego malluma. Feliĉe la mano de patra kaj pia amiko tiam metiĝis sur la mian, kaj li ordonis, kun firma boneco, ke mi ekmarŝu kaj supreniru al la lumo. Kiel feliĉa mi estas, tial ke mi retrovis funde de mi mem, iom de animo mia kaj de miaj preĝoj infanaj! Oh! kiel dolĉe esti humila, konfidi kaj obei! Apenaŭ mi altenrampis la unuan marŝadon, kaj jam malaperas la nebulego de malhumileco kaj malpureco, kiu kaŝis al mi la bonan vojon.

Plialten, animo mia! Ĉiam plialten! Super ĉio, kion oni vidas de l'ĉielo! Kian memoraĵon alvokis mi, antaŭ momento? Sur la monto, mi supreniris nur al la suno. Hodiaŭ, mi altiĝas al klareco senkompare pli brilega; ĉar laŭ la bela vorto de Mihel-Ang' (Michel-Ange), la suno estas nur ombro de Dio.

*Reeldono malpermesata.*

Em. PELTIER.

## PRI NOMOJ PROPRAJ

Estimata Sinjoro Direktoro.

Al mia artikolo « Pri nomoj propraj en Esperanto » (E. K., n-o 14), mi petas la permeson almeti ankoraŭ kelkajn klarigojn.

Antaŭ ĉio mi kore dankas S-ojn L. de Beaufront, L. P., kaj Prof. E. L. pro iliaj tre ŝatindaj rimarkoj.

Tute prava estas Prof. E. L., ke « la gramatikistoj ordinare prenas la radikon el la genitivo ». Sed mi ne povis ilin plene sekvi en tio ĉi, ĉar ilia dirita ordinara regulo estus alkondukinta min al nomoj FELICO, KLEMENTO, HERMETO, AGNETO, k. c., kiuj ŝajnis al mi nebonaj. (Vidu principon 3-an).

La nomoj MATTHAEUS; THADDEUS, estas skribindaj en Esperanto MATTEO, TADDEO; tiun ĉi korektaĵon de S-o E. L. mi plene aprobas.

La decidon pri la uzo aŭ forigo de ĥ en nomoj propraj mi forlasas al la estonta nia centra komitato aŭ Esperanta Akademio.

Kio do tuŝas nomojn AŬGUSTINO, JUSTINO, VALENTINO, pri kiuj parolas S-o L. de Beaufront, mi bedaŭrinde ne povas konsenti kun la tre estimata redaktoro de L'ESPÉRANTISTE; al kiu la formoj: AŬGUSTENO, JUSTENO, VALENTENO ŝajnas preferindaj. La sola argumento, ke de ili « ni povas facile kaj regule formi la inajn nomojn dirante: AŬGUSTENINO, JUSTENINO, VALENTENINO, » ne estas tre konvinkanta. Ĉar tiel same facile kaj regule ni povas ankaŭ formi la nomojn inajn de AŬGUSTINO, k. c., dirante: AŬGUSTININO, k. c., se oni bezonus ilin. Sed ĉu ili estas bezonaj, JEN NOVA DEMANDO, kiun mi proponas al la atento de l'Esperantistaro, Mia opinio pri tio ĉi estas tute neiga. Ĉar se ni

latinajn nomojn EVA, MARIA, SARA, esperantigas anstataŭigante en ili la latinan finiĝon -A per la esperantan -O (EVO, MARIO, SARO), kial do ni ne povus latinajn nomojn AŬGUSTINA, JUSTINA, k. c., uzadi en Esperanto en la formo de AŬGUSTINO, JUSTINO, k. c. ? Tiaj nomoj kiel JULIO, JULIA, KAJUS, Kaja, JUSTINUS, JUSTINA, laŭ mia opinio devas en Esperante sonadi kiel : JULIO, KAJO, JUSTINO. k. c., SENDIFERENCE, ĈU ILI ESTOS VIRAJ AŬ VIRINAJ. El tio okazos nenia maloportuneco, eĉ se en unu familio estus du infanoj de malsama sekso havantaj saman nomon, ekz. AŬGUSTINO, ĉar la knabon povos la gepatroj nomi AŬGUSTIĈIO, la knabinon AŬGUSTINJO. Tial estas nenia bezono de JULIA fari JULINON, de CAJA KAJINON (!), k. c..

Profunde vin estimeganta:

Prof. A. DOMVROVSKI.

Estimata Sinjoro.

De longa tempo mi studas la demandon pri propraj kaj geografiaj nomoj. Mi faris nomarojn de la francaj propraj nomoj, de ĉiuj landoj kaj grandaj urboj en la tutmondo, kaj mi provis ilin esperantigi. Mi ne plene sukcesis.....

Eble, estas preferinde konservi la geografiajn esprimojn uzitajn en ĉia lando, kaj flanke skribi en Esperanto, kiel eble plej proksimume, la elparoladon nacian.

...Mi uzas la okazon de tiu letero por esprimi la deziron, ke oni verku **PLENAN VORTARON TUTE EN ESPERANTO**. Kredeble tia laboro ne estas farebla de unu homo, sed nur de ia Akademio.

Volu ricevi, Estimata Sinjoro, miajn respektajn salutojn.

C. Ferd. Van Aken (El Bruxelles, Belgujo).

## LA KOLOMBOJ AL HERBEJO

— Invititaj de brilo de l'tago lasas kolomboj turon, kaj flugas amase en kamparon.

— Vidu ke ili malsuprenflugas ĉiuj en herbejon, kie la herboj maturaj montras sufiĉegon da semoj.

— Nenian bruon ili aŭdas ĉirkaŭe, nek vidas iun, kiu maltrankviligu ilian paŝtadon, kaj kvietaj kaj viglaj sin paŝtas.

— Silentu, ne movu vin; rigardu kiel belaj ili estas, kiel gajaj!

— Sed ha! nesingardema vi movis folion; la kolomboj ekrigardis ĉiuj al vi kaj vidis vin.

— Unu kaj kvin kaj dudek kaj cent, ĉiuj ekflugis, vivege fendas aeron, kaj vi je l'brakoj malfermitaj kaj muta sekvas per okuloj ilian rapidan malaperon.

— Ĉu vi volas konservi ĉiam sendifekta la vivon de l'senkulpeco?

— Estu vigla kiel la kolomboj, preterlasu danĝeron kiel tiuj amikoj de l'turoj.

(Korektita en rondiranto « *Voĉo Internacia* »)

Tradukis JAKOBO MEAZZINI.

## LA BONDIA MONO

En la malriĉa domo, dum la malvarma sezono, patrino kun okuloj fiksitaj al sia infano ploras kaj ekĝemas, pensante, ke ŝi ne havas plu panon !

Subite la infano ridetas kaj triumfante :

« Patrino, por eviti la malsaton kaj malvarmon, ni havos panon kaj fajron, ĉar mi iros en la preĝejon por prunti monon de l'Bona Dio ».

Okulojn malsekajn de ploroj, la infano tuj direktiĝas al la preĝejo kaj, genufleksante apud la altaro, timeme diras :

Dio mia ! pruntu al mi unu frankon... je trezoroj via mano estas plena..... nur unu frankon ! Ha ! por vi tio estas malmulte ! Kaj ni unu tutan semajnon vivos per la Bondia mono.....

La bonkora pastro kiu estis kaŝata post la altaro, ridetis aŭskultante la infanon..... Tiam, diskrete, li malmulte eliras el sia kaŝejo kaj jetas blankan moneron antaŭ la naivan prunteprenanton...

La simplanima infano konfidas sian preĝon kaj, vidante tiun ĉi moneron, kiu ŝajnis fali de la blua ĉielo :

Mi dankas vin !

Tiam li rapide kiris al sia patrino, por doni al ŝi la Bondian monon.

Esperantigis S<sup>roj</sup> FRÈRE kaj DEVOUCOUX.

## LA KNABO KAJ LA VULPO

### NORVEGA POPOLA ROKONTO

Estis unufoje knabo, kiu iris preĝejon. En la arbaro li ekvidis vulpon, kiu dormante kuŝis sur monteto. La knabo prenis per la mano grandan ŝtonon.

« Kiam mi nun mortigos la vulpo li diris, kaj vendos la felon, mi recevos monon. Per tiu ĉi mono mi aĉetos hordeon, kiun mi semos en la grenkampo de mia patro. Kiam venos la vilaĝanoj por iri preĝejon, ili diros : « Tre belkreska estas la hordeo de la knabo. »

Tiam mi diros al ili « Foriru de mia grenkampo ! » Sed la vilaĝanoj min ne obeos.

Tiam mi krios al ili « Foriru de mia grenkampo ! » Sed ankoraŭ ili estas malobeantaj.

Tiam mi kriigos al ili « FORIRU DE MIA GRENKAMPO. »

Kaj tiam ili min obeas... » Sed la kriego de la knabo ekmaldormigis la vulpon.

Ĝi eksaltis kaj forkuregis tra l'arbaro...

El la lingvo norvega trad.

NILS OEKLAND.

Skaare, pr. Haugesund (Norvegujo).

## NOTETOJ

**Rondiranto.** Nia kunbatalanto, S-o G. P. Oreškof, malĝoje sciigas, ke, pro nevenkeblaj malfacilaĵoj kaj embarasoj, *Rondiranto*, la kuraĝa Bulgara revuo, ĉesos aperi; sed nur *provisore*. Ni tre kore deziras, ke Rondiranto, kiel *La Suno Hispana*, plej baldaŭ reaperu vivoplena kaj fortega. La I-a jarkolekto (5 fr.), la II-a jarkol. (4 fr.) kaj la III-a (6 numeroj, 2 fr.) estas aĉeteblaj de l'Klubo « Stelo », ĉe S-o Oreškof, en Plovdiv, Bulgarujo.

### **Societo internacia esperantista por la paco.**

La demando pri lingvo internacia estas enskribata en la programo de la 14<sup>a</sup> tutmonda Pac-Kongreso, kaj de la 3<sup>a</sup> franca Pac-Kongreso, kiuj kunvenos tiun someron en Lucernon kaj Lilleon.

Jam la 1<sup>a</sup> Kongreso tutmonda (1889), kaj poste la 8<sup>a</sup> (1897) esprimis sian intereson pri tiu demando oni povis certigi ke ĉiuj Societoj por la Paco akceptas la principon de lingvo internacia. Bezone estas nun komprenigi ilin, ke la problemo estas solvita

Estus do tre utile fondi, se eble, antaŭ tiuj baldaŭaj kongresoj, internacian « Societon esperantistan por la Paco ». Tiel, la kongresanoj havus la nediskuteblan pruvon de la taŭgeco de nia lingvo.

La esperantistoj, kiuj estas « pacifistoj (t. e., kiuj estas jam anoj de la Societo por la Paco, aŭ kiuj ne estante tiaj, intencas favori la movadon por la Paco) estas petataj konigi sin al S<sup>ro</sup> Gaston Moch, 16, avenue de la Grande-Armée, Paris, 17<sup>e</sup>, kiel eble plej baldaŭ.

Li sciigos ilin, per tui-ĉi sama revuo, pri la nombro de la ricevitaj respondoj, kaj sekve pri la ebleco de sia projekto.

**L'Est Sportif** (Oriento Sporta) Marto 5-a.-Enhavas paĝon en Esperanto sub la redakciode inĝeniero D-ro L. Pourcines. En tiu n-o S-o Pourcines publikigas leteron malfermitan al S-o Frécot, kasisito de la grupo Nanci'a, por klarigi la tialojn de sia eksiĝo el tiu grupo.

**La Suno Hispana** (Marto) enhavas la belan poezion « Homo », de nia klera kunlaboranto, A Dombrovski, publikigita en *Espero Katolika*. Kun la Esperanta teksto estas versata traduko hispana de P. J. Felis.

## ŜAKLUDADO INTER ESPERANTISTOJ

(ŜAKREDAKTORO « J. L. S. » ĉe LA DIREKTORO DE E. K.)

Via Direktoro, kies konsilo estas atentinda, petis ke mi verku areton da ŝaklecionoj por lernantoj. Jen la unua!

Konsiderante la agadon de la pecaro kiel historion, oni devas atenti, unue, la ludkomencon; sed konsiderante ĝin, kiel objekton studindan, la ludkomenco, kiu estas ĉiam nebone komprenata eĉ de tre lertaj ludantoj, ne estas gravega. Ĉe la studado oni devas lerni unue la simplan kaj poste progresi ĝis la malsimpla. Se vi ne bone komprenas, kion fari per tri, kvar pecoj, kion vi faros per tridek-du? Mi

prezentas dekon da facilaj mortigoj, (ili ne estas problemoj), per kies solvoj la lernanto ekvidos la potencojn kaj funkciojn de la pecoj kaj lernos kiel *fari planon*. Multe da tiaj mortigoj okazas ĉiutage, sed estas, nevidataj, ĉar la ludanto sin kutimigis nek kunceligi siajn irojn, nek vidi antaŭen por trovi mortigon. Mi petas vin solvi ilin, kaj mi aljuĝos al ĉiu korekta solvo unu poenton, kiun mi enkalkulos, kiam mi starigos la sistemon por donaci premiojn, pri kiu sistemo mi skribis lastmonate.

La kondiĉo estas la sama por ĉiu el la sekvaj Blanko komencas kaj mortigas per sia dua iro. Tuj sekve de la komencaj literoj de la pecoj vi trovos ke la kvadratoj, sur kiuj ili staras, estas montrataj per malgranda litero kaj cifero. La malgranda litero montras la linion, a = TD linio, b = ĈD linio, k. t. p., legante de maldektstre, dekstren; la cifero montras la numeron de la kvadrato, legante kvazaŭ Blanko ĝin nomas, t. e. de la Blanka flanko de la tabulo. Tiel, f6 estas KRB6 kaj KRN3. Tia notada metodo estas la germana.

No. 1. NRh8, NDb8, NTd7, NKg8; BRh6, BDg4, BSf6.

No. 2. NRh8, NSh6; BRf7, BĈd7.

No. 3. NRb3, NDg3, NTg3, NSa7; BRc1, BDh1, BTb3, BĈb5.

No. 4. NRh1, NDd1, NS-ojg2, h2; BRf2, BDh5, BTe4.

No. 5. NRa7; BRc6, BSc7.

No. 6. NRg8, NDd8, NTe8, NS-ojf7, g7, k7; BRh1, BDC4, BT-oje5, f1, BĈf5.

No. 7. NRd4, NSd5; BRb3, BDe3, BS-oj c2, e4, f2.

No. 8. NRa6; NSa7; BRc8, BKa5, BS-oj b3, 4, BĈ-oj, c6, d5.

No. 9. NRf5, NSf3; BRc7, BDd2, BKb3, BĈg4, BSg3.

No. 10. NRg8, NDg3, NTf8, NKf4, NS-oj f7, g7, D7; BRh1, Db7B, BTe1, BKc4, BS-oj f3, g2, h3.

Sufiĉos se vi sendos nur la unuan solvan iron. Adresu ilin, mi petas, al « J. L. S », ĉe La Direktoro de E. K.

**Ŝaka Korespondado** — D. F. (Dunedin, Nova Zelando). Mi sendos la 8-an numeron de L. I. tujkiam mi ricevos ĝin el Parizo.


### Solvo de problemo 1-a.

Ŝlosilo : T-7R. 1 Ĉ × T. 2 Ĉ5  
D-6KR. 2 Ĉ-kien ajn. 3 Ĉ5T 6KD  
Ŝak. kaj mortigas. Se NĈ ne  
kaptas T-on, Bl. mortigas per la  
2-a iro : Ĉ5T-6KD.

**Korektaj solvoj de prob. 1-a** : Estulna ; Joz-o Rhodes.

**Probemo 2-a** : Blanko komencas kaj mortigas per sia 2-a iro,

NIGRO



BLANKO